

Redakcio kaj Administracio: MISIONES 369 Buenos Aires

Argentina Esperantisto

Oficiala Organo de Argentina Esperanto-Asocio

Jara Abono: Enlande, $ 2.- Ekstere 2 sv.f. Spec. 1 resp.k.

 Nov-Decembro 1935  N-ro. 116 - 117 

OTRA JORNADA

Llegamos al fin del año, y queremos una vez más, como el caminante que hace un alto en el camino, considerar las ventajas que el movimiento esperantista de nuestro país alcanzó durante el transcurso del mismo.

Si este juicio fuera exclusivamente de carácter local. es decir, circunscripto solamente al movimiento de la capital, sin duda que éste no sería muy halagüeño.

Las tareas de nuestra Asociación exigen una constante y pesada dedicación, que a la larga abruman a aquellos cuya misión es hacerlas efectivas. Y esto ocurre, no solamente con respecto a los esperantistas que podríamos llamar de la última cosecha, sino aun con los veteranos, que muy a menudo vemos flaquear, no ya en su entusiasmo y fé a la causa esperantista, sino en su aporte personal a la obra de propagación y divulgación del Esperanto.

Precisamente esta circunstancia hace más meritoria la labor de aquellos pocos. quienes desde sus respectivos puestos han tenido que cumplir la doble tarea de consolidar la Asociación, al mismo tiempo que cuidar el funcionamiento y extensión de sus actividades.

Quizás no deje de ser oportuno, el hacer constar una vez más, que la Asociación aceptará con júbilo, la cooperación de todos los "samideanoj" que estén dispuestos a prestar su esfuerzo personal, para la mejor organización de los trabajos de nuestra entidad.

Pero, si bien el movimiento esperantista de nuestra ciudad, no ha realizado mayores progresos durante el año en curso en cambio podemos señalar, con justificada satisfacción, los avances que éste ha realizado a través de todo el país.

A la reorganización de la Asociación Esperantista de Rosario se sucedió la fundación de entidades similares en Bahía Blanca, Serodino, Pergamino, Córdoba y últimamente en San Jorge.

Desde luego no vamos a caer en el infantilismo de considerar a estas agrupaciones como entidades perfectamente arraigadas. Bien sabemos lo que significa la fundación y sostenimiento de un grupo esperantista, en un medio refractario e indiferente.

Pero de cualquier manera, por ahí hay que empezar; estas organizaciones, ahora enclenques y vacilantes. han de ser, a no mucho tardar, gracias al esfuerzo y calor de todos nosotros, entidades fuertes, capaces de cumplir la misión que se han propuesto llevar a cabo.

Claro que corresponde a todos los esperantistas, no importa el lugar donde se encuentren, apoyar y ayudar a todas las sociedades del país. Entendemos que sería inoportuno, sentirse desvinculado de otro grupo, del que se actúa.

Como buenos esperantistas. debemos sentirnos espiritualmente unidos con todos los compañeros de ideal, y satisfechos de los progresos del Esperanto en cualquier latitud del país, siempre dispuestos a no ahorrar esfuerzos para facilitar la obra de aquellos "samideanoj", residentes en lugares donde por cualquier circunstancia atraviesen momentos favorables o desfavorables al Esperanto.

Por ejemplo, nuestros colegas de Rosario se encuentran en la envidiable situación de poder usar para la propaganda, el modernísimo medio de difusión, que es la radiotelefonía. Desde la estación L.T.1. *propalan todos los jueves de* 18 *a* 18.15 *horas un boletín noticioso sobre el Esperanto. Es un deber de todos nosotros en este caso — y en otros parecidos, que en el futuro pudieran producirse — colaborar en lo posible. por los medios que nos dicte la oportunidad y nuestro juicio, ya sea escuchando estos noticiosos, mandando*



ESPERANTO EN ARGENTINO

Ni, argentinaj esperantistoj, finas la jaron plene kontentaj pri la progreso de nia movado ĉe ni.

Unu post alia, stariĝis diversflanke en nia lando esperantaj grupoj kiuj venas kunlabori por la disvastigo de Esperanto en la lando; tasko, kiu antaŭe pezis ekskluzive sur la ŝultroj de la ĉefurbaj esperantistoj.

La esperantistaj societoj ĝis nun fonditaj estas: Esperanta Asocio de Rosario — Esperantista Societo de Córdoba — Esperantista Societo de Bahia Blanca — Nova Sento de Pergamino — Esperantista Societo de Serodino kaj Lumo de San Jorge. — Sed la afero ne ĉesas ĉi tie; pro diversaj motivoj ni rajtas esperi ke tiu ĉi nombro baldaŭ pli grandiĝos.

Sendube, ke la plimulto el tiuj ĉi grupoj estas malfortaj, malgrandaj kaj eĉ ŝancelaj, sed, ĉu oni konas ian estaĵon, kiu eknaskiĝante, estu forta kaj potenca?

Tempo maturigas fruktojn. Eĉ dum momento ni ne dubas pri la sukcesa estonto de niaj enlandaj societoj.

Tiu ĉi opinio ne estas fantazia, nek frukto de tre kompreneblaj deziroj.

La kapablo kaj entuziasmo de multaj enlandaj pioniroj permesas al ni tion diri.

Kaj ne estos eksterordinare se ni, la ĉefurbaj esperantistoj devas pli ol unu fojo, imiti — se eble — aŭ envii ilian agadon.

En tia stato ni estas, niaj samcelanoj el Rosario ĝuas la imitindan, enviindan okazon, disradii ĉiu ĵaude de la 18 ĝis 18 kaj 15 minutoj, el la grava loka stacio L. T. 1, esperantistan bultenon, kiu certe multe influos diskonigi Esperanton tra la lando.

Nu, nia laboro plenumota estas tre klara, ni laboru plej energie por plifirmigi la estantajn grupojn, kaj ni ankaŭ klopodu, por ke aliaj venu apud ni, en plena interkonsento kaj harmonio.

---

cartas de felicitación a dicha estación y de aliento a los rosarinos, etc., etc.

Debemos acostumbrarnos a mirar la obra esperantista de todo el país como cosa propia, alegrándonos de los éxitos, de quién quiera que sean, y compartiendo los fracasos de los otros con entereza y solidaridad.

Podemos acompañar con nuestra simpatía y estímulo, si otros medios más decisivos no tenemos a mano, a los camaradas que en otros pueblos y ciudades, que en lucha difícil, se esfuerzan por divulgar los mismos principios que nos ocupan a nosotros. Es necesario que reine entre todos los esperantistas una sincera cordialidad, que al mismo tiempo que haga más agradable y fácil la realización de nuestros propósitos nos permita afrontar en común las alternativas de nuestro movimiento, cuyo éxito nos compromete a todos por igual.

Durante nuestra última visita a los esperantistas de la ciudad de Rosario, hemos podido comprobar los beneficios de una relación estrecha entre nosotros.

Llegamos allí casi desconocidos; al poco rato éramos perfectos camaradas, reinando entre nosotros una cordialidad y simpatía como de viejos amigos.

Desde luego que no podía ser de otro modo: somos caballeros de un ideal que no encara beneficio personal alguno: no buscamos ventajas ni situaciones preponderantes, sino simplemente la divulgación de un idioma, cuyos beneficios alcanzan a todos los hombres por igual; esta común aspiración es suficiente para alejar de nosotros el más leve motivo de discrepancia, manteniéndonos unidos alrededor de la estrella verde.

Esforcémonos todos lo suficiente, para que la frase, familia esperantista, que comúnmente empleamos, cuando aludimos a la colectividad esperantista del país, no sea una bella esperanza, sino una realidad evidente.

Que una verdadera amistad selle por el momento la unión de todos los esperantistas argentinos, unión que ha de ser sin duda, fecunda en realizaciones, y que ha de allanar el camino a una pronta necesaria articulación de las entidades del país. *A. BARROT*

Resumen de la Memoria de la Comisión Administrativa

Como en los ejercicios anteriores, la Comisión Administrativa ha tenido a su cargo el contralor de las actividades de las Subcomisiones, la redacción de la correspondencia general y el mantenimiento de las relaciones oficiales con las entidades locales y extranjeras.

Nuevos centros esperantistas —

La difusión de nuestro movimiento ha cumplido este año una etapa muy importante. La formación de nuevas entidades esperantistas en el país. La C. A. estimuló y orientó a sus organizadores, y lo mismo hicieron, dentro de sus respectivas especialidades, todas las Subcomisiones. Contamos ya con sociedades esperantistas en Rosario, Bahía Blanca, Córdoba, Pergamino, Serodino y San Jorge. También se continúan las gestiones para constituir otros en Charata (Chaco) y Coronel Pringles.

Cursos orales —

Por diversas razones no fué posible realizar este año los acostumbrados cursos orales. No obstante, varios ''samideanoj'' organizaron en nuestro local cursos de práctica y perfeccionamiento.

Propaganda por radio —

Todos los jueves, de 18 a 18,15, desde el mes de octubre, el Ing. Hugo Ceretti, presidente de la Asociación Esperantista de Rosario, irradia por la estación L.T.1., informaciones del movimiento local y universal. Anteriormente el mismo Ing. Ceretti había pronunciado una conferencia de propaganda, y el Sr. Antonio Barrot, un saludo en esperanto y castellano, por la misma estación.

Consultorios médico y jurídico —

Por mediación del camarada Francisco Clevillé se ha obtenido que los doctores Elías Meilij (médico) y Virgilio A. Lasca (abogado), atiendan gratuitamente a nuestros asociados en sus respectivos consultorios.

Visitas —

Nuestra sede social recibió durante este ejercicio las visitas del Dr. Everardo Bakheuser, ''pioneer'' del movimiento esperantista en el Brasil, quien vino con su esposa; de los ''samideanoj'' Leif Oines y Ragnar Frisks (suecos), y E. Colasius (argentino), todos ellos tripulantes del buque ''Falsterbo''; del Dr. Herbert B. Naville, antiguo esperantista, profesor de una universidad californiana. Del interior, recibimos las visitas del Ing. Hugo Ceretti y del Sr. Francisco Gómez, presidente y síndico, respectivamente, de la Asociación Esperantista de Rosario; y del ''samideano'' de Jovita, señor Carlos J. Ferreira, director de la escuela local.

Por su parte, miembros de A.E.A. realizaron, también, visitas a sociedades esperantistas de otras localidades. La primera fué la del presidente, Sr. Giordano Bruno López a Montevideo; luego del Sr. Jorge Hess a Rosario, y por último, el 12 y 13 de octubre, fué a esta misma ciudad una delegación para asistir a la inauguración del nuevo local de la Asociación Esperantista.

Fiestas campestres —

Como de costumbre, se realizaron varios ''pic-nics'' en la playa próxima a la Estación Barrancas.

Movimiento de la Secretaría General —

Durante el ejercicio se recibieron 73 piezas de correspondencia, despachándose 88 en esperanto y castellano.

●

Asamblea General de A.E.A.

Estimado señor consocio:

La Comisión Administrativa tiene el agrado de invitar a usted a la Asamblea Ordinaria que de acuerdo al art. 13, Cap. VI, del Estatuto social, se celebrará el día domingo 29 de diciembre de 1935, a las 15 horas, en la sede social: Misiones 369, para tratar el siguiente:

ORDEN DEL DIA:

1) Elección de autoridades de mesa.
2) Lectura y consideración de la Memoria y Balance correspondiente al Ejercicio 1934-1935.
3) Elección de cinco miembros titulares, cuatro suplentes y dos revisores de cuentas (art. 8 y 20).
4) Asuntos varios.

Con tal motivo saludamos a Vd. muy atte.

La Comisión Administrativa.

Art. 19.—A la hora fijada, o a lo sumo media hora después, sea cual fuere el número de asociados presentes, el presidente declarará constituída la Asamblea.

Art. 20.—Para poder votar será indispensable la presentación del carnet social, como también haber abonado todas las cuotas del año correspondiente.

TRA NIAJ SUBKOMITATOJ

Gazeta Fako —

Las actividades de esta Subcomisión en 1935 han tenido que desenvolverse, como en años anteriores, dentro de un reducido marco financiero, que restringe, naturalmente, toda iniciativa tendiente a mejorar nuestro órgano oficial. No nos referimos, precisamente, a la presentación de ''Argentina Esperantisto'', sino a la periodicidad de su aparición, pues desearíamos editar un número mensualmente, ya que el rápido progreso del movimiento esperantista local exige un órgano de aparición más frecuente, y, también, de mayor número de páginas.

En 1935 hemos reorganizado nuestro fichero de canje, y obtenido el intercambio con revistas importantes que antes no se recibían en ese concepto.

La formación de las nuevas agrupaciones esperantistas en el interior, ha tenido, lógicamente, su reflejo en ''Argentina Esperantisto'', que no sólo ha registrado en sus páginas esas novedades, sino que ha tratado de estimular a los dirigentes y miembros de los mismos con artículos en que se daban indicaciones y se hacían sugestiones útiles. Ultimamente se ha dirigido una circular a esas entidades, invitándolas a colaborar en la revista y a nombrar corresponsales para que mantengan relaciones directas con esa Subcomisión y se encarguen, en caso necesario, de las suscripciones y avisos en sus respectivas localidades.

BALANCE DEL AÑO

Entradas generales	$ 493.44
Salidas generales	'' 440.20
Saldo	$ 53.24
Cuentas a pagar..	$ 154.—
Saldo en caja	53.24
Déficit	$ 100.76

El déficit que arroja este balance podrá cubrirlo esta Subcomisión paulatinamente, si las cosas siguen como hasta ahora, sin la ayuda de la Comisión Administrativa; pero para realizar el plan esbozado antes, sería necesario, como ya sugerimos en nuestro informe del año pasado, que la Comisión Administrativa nos ayude financieramente.

Ekzamena Komitato —

Esta Subcomisión examinó, durante el período terminado, a los 8 alumnos del Curso por Correspondencia, que mencionamos a continuación: J. Miguel Reyes, Juan Carlos Luraschi, David Kater, Jaime Scolnik, Ignacio Huf, Elsa Zulema Poledo, Hugo Ceretti, Amadeo P. Soler y Floreal Villar. resultando todos aprobados, y se otorgó a cada uno el correspondiente diploma.

Subkomitato por Biblioteko kaj Libroservo—

Este año ha sido muy importante el movimiento de libros prestados por nuestra Biblioteca, pues han sido entregados, en tal concepto, 489 volúmenes.

Un inventario de los libros en existencia, practicado recientemente, arroja las siguientes cifras:

Documentos de Esperanto: 190; gramáticas, libros de texto y diccionarios, 71; Obras literarias, 306. En total, 567 volúmenes.

Hubo, pues, un aumento de 83 con respecto al año pasado, en que el efectivo era de 484 volúmenes. Tal aumento está constituído por 40 tomos donados, habiendo sido adquiridos los 43 restantes con fondos de la Subcomisión. Corresponde señalar en este sentido, la adhesión a la entidad editora A.E.L.A., lo que le ha permitido la obtención de varios libros, a un precio ventajoso. Esta subscripción es anual, y se ha renovado para el año próximo.

En cuanto a la sección venta de libros, es innecesario decir que la creciente desvalorización de nuestra moneda le ha impedido adquirir todos los libros que se hubieran deseado. No obstante, como se verá en el balance, ha habido una notable mejoría, en las actividades, con respecto al año anterior, gracias al aumento en las ventas de libros, material de correspondencia, estrellas esperantistas, tarjetas postales, etc.

Saldo del año anterior al 30|11|34	$ 15.—
Entradas hasta el 30|11|35 ..	'' 215.32
	$ 230.32
Salidas	'' 192.31
Saldo a favor	$ 38.01

Instrua Fako —

Tropezó esta Subcomisión, en el ejercicio terminado, con varios inconvenientes, siendo el más importante de ellos la escasez de personal de la Subcomisión, dificultad que fué salvada efectuando un envío mensual de 5 lecciones, en lugar de uno semanal de 1 lección. Además, miembros de otras subcomisiones colaboraron en ésta en diversos trabajos, con lo que pudo resolverse la situación difícil de Instrua Fako en este aspecto. Desde el 1º de diciembrs de 1934 hasta el 30 de noviembre del corriente año se inscribieron 497 alumnos. El número de lecciones enviadas en este período alcanza a 11.598. Terminaron el curso 335 alumnos.

Ingresos generales, 1935	$ 1.481.40
Egresos	'' 1.156.50
Saldo favorable	$ 324.90

Informa Fako —


Este año, Informa Fako continuó el envío de sus circulares informativas mensuales, cumpliendo así uno de sus objetivos, o sea el de hacer llegar a la prensa del país novedades interesantes relacionadas con el movimiento esperantista local y extranjero, a fin de que éstas sean difundidas en diarios

UN NUEVO CENTRO ESPERANTISTA

●

Se fundó en San Jorge, F. C. C. A.

●



Membroj de la grupo LUMO, el San Jorge: Maldekstre, dekstren, S-ro L. Flury, S-ino Angela C. de Flury, F-ino Palmira Pradi, S-ro R. Faro, F-ino Bayita Lafert, S-ro Pedro Bernardón, F-ino Sarita Lafert, S-roj: A. Avila, O. Tolosa kaj J. Juarez

Con la satisfacción que supondrán nuestros lectores, damos cuenta de la fundación de un nuevo grupo esperantista en la localidad de San Jorge, F. C. C. A., que viene a sumarse a los que están empeñados en la no siempre fácil tarea de divulgar el idioma internacional Esperanto.

Como acto previo, las autoridades del nuevo centro resolvieron celebrar una exposición esperantista, la que fué todo un éxito. Concurrieron a la misma, muchas personas de la localidad y de los pueblos circunvecinos. llevándose todas la impresión de la utilidad y difusión del idioma auxiliar. Concurrió al acto inaugural una delegación de esperantistas rosarinos, compuesta por el Ing. H. Ceretti, P. Martín, B. Dos, H. Calógero, y F. Gómez.

Hicieron uso de la palabra en dicho acto los Sres. Lázaro Flury, del grupo organizador, y H. Ceretti, por los rosarinos.

Vistos los resultados alcanzados por los "samideanoj" de San Jorge con dicha exposición, quizás sea oportuno que los otros grupos estudien la posibilidad de realizar actos semejantes. Desde luego, se puede contar con el material adecuado de los esparantistas porteños, así, sin duda, con el de los del interior.

La iniciación de las actividades del grupo "Lumo" no pueden ser más felices; no dudamos que han de seguir actuando de tal conformidad, dado que los componentes de tal grupo, muchachos jóvenes, estudiosos y entusiastas, permiten suponerlo así.

Como corolario, los esperantistas de esta localidad publican una revista titulada "Luz", desde donde han de bregar por el Esperanto y por su enseñanza.

---

y revistas. El éxito no ha sido enteramente satisfactorio, pues si bien las publicaciones del interior colaboran con muy buena voluntad en esta campaña, los diarios grandes de la Capital, muy difícilmente se deciden a intercalar una iñformación relacionada con el Esperanto limitándose únicamente a hacer aparecer sueltos anunciando nuestros cursos por correspondencia. Esto último, a pesar de todo, debe estimarse en todo su valor, pues sin esos sueltos publicados sistemáticamente en la media docena de diarios más importantes del país, el Curso por Correspondencia no habría llegado a inscribir una cantidad tan elevada de alumnos.

Ultimamente esta Subcomisión ha iniciado la reporducción, en una hoja mensual, impresa, de informaciones aparecidas en el número anterior respectivo de "Argentina Esperantisto", aprovechando, para abaratar su costo, las formas usadas en esta revista. Se trata de obtener que estas hojas sean adquiridas por los "samideanoj" y las sociedades esperantistas del país, a fin de que con lo que se obtenga de ese fondo, la Subcomisión pueda lograr su autonmía económica, mejorar sus servicios informativos y crear otros.

BALANCE

Entradas	$	48.65
Salidas	"	43.30
Saldo	$	5.35

Pioniroj!

Verkis Okulvitre

Estas multaj personoj — kaj ĉiam estis — kies nura priokupiĝo estas la plej bona solvo de siaj privataj aferoj, sendepende de iu alia konsidero.

La mondo estas simpla kampo por iliaj klopodoj; ŝtupo ofte sufiĉe taŭga por bona ekonomika prosperado; por ili ĉio ekzistanta valoras nur laŭ la eltirebla profito.

Tre praktikaj homoj, ili ne perdas sian tempon post idealoj, kiuj ne devigas esperi certajn kaj tujajn avantaĝojn, sed nur oftajn ĝenojn kaj kapdolorojn.

Por ili, la konfliktoj kaj problemoj de nia mondo, estas nur individuaj aferoj, tiu, kiu troviĝas en bona stato, tiu venkis, la aliaj devas ankoraŭ bataladi — ne gravas kiel — ĝis venko.

En iliaj kapoj ne povas enloĝiĝi la ideo ke aliaj homoj uzas sian tempon, monon kaj paciencon, subtenante ideon, kiu nenian materian gajnon povas liberi al ili, kaj pri kies utilo, iliaj kalkulemaj cerboj ne antaŭvidas la plej etan profiton.

Ne estas mirinda do, se ni esperantistoj, tro ofte estas rigardataj, de multaj flankoj, kiel strangaj estaĵoj, kiel frenezuloj — certe ne danĝeraj— sed tute erarintaj pri la celo de la homa vivo; ni perdus nian tempon post ĥimeraj idealoj, rigardante estontajn plej bonajn tempojn, preterlasante multajn okazojn por enĝojigi nian nunan ekziston.

Ili ne komprenas, ke, ne nur per pano sin nutras la homo.

Ke, se granda feliĉo povas veni per la plena satigo de niaj korpaj postuloj, plej grandan ĝojon ni trafas batalante por altruistaj kaj bonfaraj idealoj, kiuj indignas nin kaj plenigas la homan vivadon per kreanta febro, per emocioj, kontrastoj, venkoj kaj malvenkoj, kreante, forĝante la karakterojn kaj personecojn de la progresemaj homoj.

Feliĉe, estas — kaj ĉiam estis—personoj kiuj eĉ tute forgesante pri si mem, batalas por pli justa kaj racia ordigo de la homa socia vivo; kiuj, ĉiam pledis por levi la kulturan nivelon de la popoloj, kiuj eĉ oferante sin, laboris por la libero, kulturo kaj bonstato de siaj posteuloj.

Ili estas la kreantoj de la civilizacioj, tiuj kiuj puŝas la progresan ĉaron.

Al ili oni ŝuldas la senĉesan evoluadon kaj aliformigon de nia mondo, kaj ke ni vivu malgraŭ ĉio, en pliboniganta mondo.

La esperantistoj okupas lokon apud ili.

Ili ankaŭ batalas por la malaperigo de lingvaj baroj, kiuj malproksimigas kaj fremdigas unuj homoj la aliajn.

Pioniroj ankaŭ ili estas. Ili klopodas el sia flanko, por ke la nuna sanganta kaj suferanta homaro transiru al plej ordaj kaj feliĉaj tagoj.

Ili kunhelpas laŭ pove, la konstruadon de nova mondo, kie Esperanto plenumos sian interligan taskon, por la bono de la homaro.

Intérpretes de Esperanto

La Feria de Reichenberg, Checoeslovaquia, como en años anteriores, utilizó este año el Esperanto para su propaganda, pero agregando una sección especial dedicada a este idioma, y un cuerpo de intérpretes conocedores del mismo, para que atendieran y sirvieran de guías a los visitantes esperantistas. Esta no es, verdaderamente, una gran novedad, pues son varias las exposiciones internacionales que han adoptado en forma permanente nuestro idioma internacional, pero sirve, en cambio, para dar la sensación de la difusión y prestigio alcanzados por el Esperanto, en la Europa Central. De no haber contado los organizadores con la concurrencia de un número regular de esperantistas, no habrían preparado un servicio de intérpretes que, además de los idiomas corrientes hablaran el Esperanto. No se trata de la actitud de entusiastas y desinteresados propagandistas, sino de intérpretes profesionales que han agregado a su repertorio de idiomas el Esperanto.

La Unua Esperanta Societo en Argentino

El la libro "TRAVIVAĴOJ" de Ro. Ŝo.

Itala maljunulo, kun kiu mi ofte ludis ŝakon en la literatura societo (ankaŭ tie ni havis klubon) foje demandis min, ĉu mi legis artikolon pri Esperanto Mi respondis ke mi ne legis nek deziris legi; mi jam en 1886 studadis Volapukon dum ses semajnoj, kaj tio sufiĉas. Post kelkaj monatoj, ĉe la fino del' printempo, en Novembro 1906 (en Bs. As. ne estas kiel en Eŭropo) profesoro Pennington venis kaj petis min helpi lin starigi esperantan grupon, kaj lin akompanis s-ro Farnes el Londono; ambaŭ lernis Esperanton dum ses monatoj. Mi respondis, ke mi nenion scias pri tiu lingvo, sed profesoro Pennington diris, ke mi tre facile lernos, kaj multe povos helpi lin, kaj tio decidigis min. La literatura Societo metis provizore al nia dispono ĉambreton, ni trovis ses aliajn naivulojn kaj ĉe nia unua kunveno decidis starigi societon, mi proponis ke oni elektu la profesoron prezidanto, s-ron Farnes sekretario. Ekzistis de nun la unua argentina societo, kiu unuanime decidis, ke la prezidanto skribu al Doktoro Zamenhof, ke li bonvole akceptu honoran prezidantecon; kaj efektive li akceptis. Al nia dua kunveno venis s-ro Henriko Muñoz el Montevideo por viziti nin kaj helpi per sia konsilo. Li jam parolis flue Esperanton; li vidis nian anoncon en la loka gazeto. Post ses kunvenoj ni decidis lasi la aferon dum kelkaj monatoj, ĉar dum la varmega somero tiom da membroj ne povis veni de la ĉirkaŭ-urboj. Kiam ni ree komencis, la unua kunveno okazis en la komerca lernejo, kie preskaŭ ĉiuj lernantoj ĉeestis, por aŭdi la novan lingvon. Pri la argentina societo mi nenion pli povas diri, ĉar unu semajnon poste mi forlasis la Respublikon.

La unua impreso, kiun faris sur min la legado de la du angloj estis ke ilia elparolado estas negusta; ili montris al mi bone konatan anglan lernolibron, sed mi nur respondis ke neniu pola sinjoro elparolus tiamaniere, pri tio mi estas tute certa; nur pri "shs", "sehp", "ohk", "dehk", ktp., mi konsentis provizore ne insisti. Tio ne estis grava cetere malbonaĵojn mi facile povos mallerni, kion mi efektive poste devis fari.

Sur la vaporŝipo "Aragon" sidadis apud mi ĉe la manĝotablo tre afabla sinjorino, kiu interesiĝis pri Esperanto. Mi penis helpi ŝin kaj pruntedonis al ŝi mian lernolibron; kian libron mi ne volas diri, al la lerta verkisto ni multon ŝuldas, li faris sian eblon, kaj faris ĝin bone, nur la elparoladon li tute ne kaptis, eĉ tion mi ne riproĉas al li; li instruis, kion li mem estis lerninta, kaj perfektecon oni ne ĉiam akiras ĉe la komenco. Mi memoras, ke kiam S-ino Gomm (la nomo de mia kunvojaĝantino) demandis al mi, kiel oni nomas "to like", kaj ĉu oni povas diri "mi amas (love) pudingon", mi respondis, ke ŝajnas al mi, ke oni povas ami personon, sed oni "likas" pudingon". Bone, nun mi opinias, ke la vorto "liki" ne estas aprobita de la lingva komitato, eĉ ne troviĝas en certa nenomota vortaro, kaj tial preferinde estas kontentiĝi pe rla verbo "ami" aŭ "ŝati".

En la libro, kiun mi pruntis al S-ino Gomm, troviĝis poŝtkarto, kiun estis sendinta al mi s-ro Henriko Muñoz el Montevideo post sia reveno el Buenos Aires; ĝi estis la unua esperanta poŝtkarto, kiun mi iam ricevis, kaj mi rigardis ĝin kiel trezoron. Ĝi diris: "De tiu ĉi flanko de la riverego, kiu nin apartigas, mi sendas samideanan saluton". Mi bone memoras, ke la vorton "samideanan" mi ne komprenis. Ĉi tiun poŝtkarton mi uzadis kiel montrilon ((lokomontrilon). Alveninte al Southampton, s-ino Gomm redonis al mi la libron, sed mankis la poŝtkarto, kiun ŝi ne povis trovi, kaj kiun mi multe domaĝis. Pro tio kompreneble mi ne povis malpaci kun tia ĉarma sinjorino, kiu promesis sendi al mi la karton, se ŝi ĝin trovos; ni do vojaĝis kune, akompanataj de s-ro Gomm, Brita konsulo se mi ne eraras, en Curitiba, Brazilo, ĝis Londono, kie ni adiaŭis unu la aliajn.

Mi scias, ke en Brazilio oni faris grandan progresadon, do tre povas esti, kaj treege mi esperas, ke S-ino Gomm fariĝis lerta esperantistino. Eble, kiel Anglo brazilianino, ŝi abonas al "British Esperantist" kaj nun scias, ke mi jam ne "likas", pudingon, sed laŭkondiĉe ĝin amas.

Nekrologo

Jen ankoraŭ unu foje ni devas informi niajn legantojn pri malgaja sciigo.

S-ino Valentina G. Presmanes de Lopez Hidalgo, patrino de la prezidanto de Argentina Esperanto Asocio, forpasis la 9an de la Novembra monato.

Estas nedubeble ke, post iom da tempo nia kara amiko Giordano B. Lopez travivas tre malagrablajn okazintaĵojn, kiuj fakte elpruvas lian rezistkapablon al doloroj.

Ni esperu ke tiu malfeliĉo signalu la komencon de plej agrabla vivado.

Al S-no Lopez kaj liaj familianoj ni transdonas la sincerajn kondolencojn de A.E.A. kaj de ARGENTINA ESPERANTISTO.

****

El Esperanto en el Congreso Internacional Vegetariano

El noveno congreso internacional vegetariano organizado por la Unión Internacional de Vegetarianos, durante el mes de Agosto en Daugaard, Dinamarca, aceptó la proposición del delegado holandés Sr. D. E. Lissauer, en el sentido de admitir al esperanto como idioma oficial en los congresos vegetarianos. Además, aprobó la moción que instituye a este idioma como el único para todas las traducciones. Por último, el congreso se dirigió a las autoridades de la Unión para que estimulen a sus asociados a estudiar el esperanto, con el fin de que en los sucesivos congresos puedan celebrarse usando una sola lengua.

Niaj grupoj laboras

Malgraŭ ke la sezono ne estas oportuna por vigla movado, niaj amikoj de la grupo Antaŭen el Cordoba, sufiĉe multe laboradas.

Speciale ni devas mencii la agadon de nia samideano D-ro. J. Scolnik kiu el la loka radistacio L. V. 2 faris kvar mallongajn paroladetojn.

La unua el ili okazis la 8an. de Oktobro. Temo: La problemo de internacia helpa lingvo.

La dua okazis la 15an de Oktobro. Temo: Esperanta Gramatiko.

La tria okazis, la 22an. de Oktobro. Temo: Esperanta Vortaro, kaj la lasta okazis la 29an. de Oktobro. Temo: La graveco de Esperanto. Gratulojn kaj sukceson.

Viziltoj

Lastatempe vizitis nian sidejon S-ro B. van Spiegele, marista radiotelegrafisto el Antverpeno..

S-no. Herbert B. Langille, profesoro el la Kalifornia Universitato.

S-no. Alberto Collasius, argentina maristo, kiu revenis tre esperantigita.

Fine ni havis tre agrablan ĝojon akceptante ĉe ni, la entuziastan kaj fervoran esperantiston el la urbo Cordoba, D-ro J. Scolnik.

Nuevo Centro Esperantista

A último momento recibimos la noticia de la fundación de un nuevo Centro Esperantista en la localidad de Hersilia, F.C.C.A. En el próximo número irán detalles.

Novaj membroj de A. E. A.

Humberto Cappelletti, Rosa Montovani, Julio Mosches, Richard Schramm, Cancio Gaibbisso, Juan Viarnes Sabaté.

CRÓNICA MUNDIAL



La Radio Estación verde

Tal es el nombre con que han bautizado a la estación de radio de la ciudad de Brno, los esperantistas europeos. Desde hace tiempo, son famosas por toda Europa las transmisiones en Esperanto que se realizan desde tal emisora, justamente famosas por el elevado valor artístico y literario de los mismos.

Este año, al iniciarse la temporada de radio, el director de dicha estación leyó un conceptuoso discurso en nuestro idioma, dedicado al gran número de radio-escuchas que esta emisora cuenta por toda Europa.

Anunció el propósito de dedicar al esperanto audiciones más extensas, y una vez al mes, conferencias en este idioma.

En uno de sus párrafos se expresó de la siguiente forma:

''Esperamos que otras estaciones imitarán nuestro ejemplo, de transmitir programas completamente en esperanto, y que no está muy lejano el día en que los radio-escuchas europeos escucharán Londres, París, Moscú, de occidente o oriente, Berlín, Roma de norte a sud; y que ellos no solamente oirán, sino que entenderán lo que escuchen.

Sin duda que esto será muy interesante para nosotros, los europeos, porque conocer un idioma significa comprender las ideas expresadas con el mismo.

Con tales sentimientos, de mútua intercomprensión y colaboración cultural, comenzamos la primera hora de esperanto de la temporada, deseando a todos una feliz recepción''.

Cuenta esta radio difusora con un elenco de artistas muy valiosos y competentes, actores de radio, escritores, cantantes, etc., los que, aparte de sus representaciones radioteatrales, toman parte activa en escenarios. Por ejemplo, durante el sexto congreso esperantista checoeslovaco, realizaron diversas representaciones escénicas, cantos, etc.

Exito de un libro para la enseñanza del Esperanto.—Acaba de aparecer la 7a. edición del libro de S. Rublev ''Krujok Esperanto'' destinado a la enseñanza de ese idioma entre los rusos. La primera edición había aparecido en 1926, aumentando en las sucesivas el tiraje hasta llegar, en la última, a 100.000 ejemplares. Existen, además, ediciones en alemán, ukraniano, francés y búlgaro.

Por medio del Esperanto se difundirá la literatura armenia. — Las autoridades de Armenia, han comenzado la publicación de traducciones al Esperanto de las obras más representativas de la literatura de ese país. El plan para el presente año comprende la edición de 5 obras.



Stelo Villafranca Casanovas. Ĉarma filineto de la esperantistaj geedzoj Villafranca-Casanovas. Ŝi partoprenis nian ekskurson al Rosario, enĝojigante nian vojaĝon kaj urban restadon.



Romanito Pallejá, filo de nia bona amiko kaj konata esperantisto D-ro. Pallejá, el Rosario. Malgraŭ lia juna aĝo, bone deklamas esperantajn poeziojn.

Debate sobre idiomas en el XIII Congreso Internacional de los Pen Clubs, en Barcelona

●

Traducimos fragmentos de un artículo que ha publicado el señor Delfi Dalmau (Lingva Komitatano), de Barcelona, en uno de los últimos números de "Oomoto Internacia", sobre el reciente Congreso de los Pen Clubs en Barcelona.

Al referirse a uno de los puntos tratados, el de una revista de los Pen Clubs, manifiesta que automáticamente se planteó el problema lingüístico.

"A simple vista, la solución parecía fácil: todos los trabajos deberían publicarse en un idioma universal, como el inglés o el francés; pero inmediatamente surgió el problema: ¿Descartar el alemán? ¿y el italiano? ¿y el español? ¿y también el ruso? El autor búlgaro Balabanoff, en un apasionado discurso, dijo que la lengua eslava debía ser aceptada, porque más de 220 millones de hombres pertenecen a naciones de idioma eslavo. El francés Crémieux respondió que, en efecto, el ruso es un idioma muy difundido, pero que es un idioma oriental principalmente, y que la revista Pen había de ser un asunto preferentemente occidental. Tal vez a causa de estas palabras de Crémieux, la delegada hindú, Sofía Wadia, dijo más tarde en la misma sesión un elocuente discurso en pro de la comprensión y conocimiento entre los hombres del oriente y occidente, el cual mereció el aplauso general. A continuación, el delegado argentino, Achával, expresó que el español debía aceptarse, porque es no sólo un idioma grande por su tradición, sino porque es el idioma del futuro.

"No sólo los citados, sino otros delegados hablaron en favor de sus respectivas lenguas nacionales.

.. ..

"Dice luego el autor del artículo, que no pudo concurrir al Congreso por impedírselo sus tareas profesionales, pero que, de haber asistido hubiera dicho solamente, que hace algunos años, J. Ortega y Gasset escribió "que generalmente es una comedia la expresión por medio de un idioma que no sea el natal"; y hubiera agregado que, de todas maneras, no habría inconveniente en usar el Esperanto, pues es el idioma de todo el mundo y de todos los hombres, como segunda lengua de cada uno."

—La homo sen pacienco, estas kvazaŭ lampo sen oleo — A. MUSSET.

—Estas nur unu bono: Saĝeco, kaj unu malbono: Nescio.—SOKRATO

Caso Acusativo (III)

Por GEORGO

ACUSATIVO DE DIRECCION

Según hemos visto, se usa también la **n** final para señalar el fin (el objetivo a alcanzar) de un movimiento.

En la frase **Pedro golpea a Carlos,** señalamos con la preposición **a** el objetivo, el blanco, de una acción.

En la frase **Pedro va a Rosario,** señalamos también con la preposición **a** el objetivo de una acción—de un movimiento, en este caso.

Así decimos en Esperanto: **Petro batas Karlon.**

Y del mismo modo: **Petro iras Rosarion.**

Este acusativo de dirección nos permitirá distinguir de inmediato el lugar dónde algo o alguien se encuentra, del lugar adonde algo o alguien se dirige.

Ej.: **Kie estas Petro? — li estas tie**
¿dónde está Pedro — él está allí
Kien li iros? — li iros tien
¿adonde irá él — él irá allí o allá

Ĉu vi promenos ien? — Jes, mi iros tien, kie mi trovos freŝan ombron.

¿Irá Vd. de paseo a algún lado? —Sí, iré allí, donde encuentre fresca sombra.

Petro loĝas en Argentino

Petro veturas en Argentinon.

Después de preposición indicando dirección se usará el nominativo.

Petro iras ĝis la parko — Petro iras al la parko.

Pedro va al (hasta) el parque —Pedro va al (hacia) el parque.

La frase: Pedro va al parque, puede significar: en dirección al parque, hacia el parque o bien hasta dentro del parque. En Esperanto no hay confusión — gracias al acusativo.

Ej.: **Petro promenas...**

ĝis la parko; al la parko; en la parkon
hasta — al, hacia — hasta dentro

en la parko
en, estando dentro

Más ej.:

La muso kuris sub la liton

La laucha corrió debajo la cama (de fuera hacia debajo la cama).

La muso kuris sub la lito
(estando ya bajo la cama)

La pulo saltis de la kato sur la hundon, kaj nun ĝi saltas sur la hundo.

La pulga saltó desde el gato sobre el perro; y ahora ella salta sobre el perro (estando sobre él).

ACUSATIVO DEL ADVERBIO

El adverbio se pone en acusativo si éste indica movimiento — ya hemos visto los ej. kie kien.

Ej.: **La birdo kuŝas tere**
El pájaro yace en tierra
La birdo falis teren
El pájaro cayó a tierra

Iri supren, supreniri — subir
Iri malsupren, malsupreniri — bajar.

Iri dekstren — ir a la derecha
iri antaŭen; antaŭeniri — ir adelante, avanzar.

Ĉiam antaŭen! —¡Siempre adelante!
Reveni hejmen — Volver a casa, al hogar

Más aplicaciones:

Meti mantelon sur sin.
Malaperis kiel ŝtono en la maron.
Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas
Ŝuti polvon en la okulojn
Ĵeti la kulpon sur iun.
Birdoj flugis trans la maron, en pli varmajn landojn.

Añadamos que después de las preposiciones **tra, ĉe, kontraŭ y ĉirkaŭ** el acusativo de dirección sólo se usará en caso que se quiera hacer resaltar idea de movimiento; pero que puede muy bien usarse el nominativo sin temor a confusión.

No se konfunda **tra** con **trans:**

Naĝi tra la rivero — Nadar por el río
Naĝi trans la riveron — Atravesar el río a nado; nadar hasta un punto colocado **más allá del río.**

(Continuará)



BIBLIOGRAFIO

EL PROBLEMA DE UN IDIOMA INTERNACIONAL AUXILIAR — Dr. Jaime Scolnik. — Revista de la Universidad de Córdoba (Argentino). Hispanlingva. Prezo ne montrita. — Verkita kiel artikolo por la revuo de la Nacia Universitato de Córdoba, ĝi nun aperas kiel broŝuro. Rapida kaj trafa pritraktado de la problemo pri lingvo internacia kaj ĝia racia solvo: Esperanto. Sed ankoraŭ foje ripetita la legendo pri la miliono da volapukistoj.

◆ Julie Ŝpuichová: **SAMIDEANA VORTARO**. Prezo .2.50 kĉ. aŭ internac. poŝta resp. kupono. Eldonis Ant Frazák Jablonne n. Orl. Ĉekoslovakio. — Alfabete ordigitaj pensoj, konsiloj, sugestoj, verkita kun la celo esti utiligata en kursoj; grupkunvenoj, diskutoj. Stilo kaj preso bonaj.

◆ĈU SOCIALISMO KONSTRUIĜAS EN SOVETIO? (Biblioteko de **Herezulo)** de E. Lanti k. M .Ivon. Formato 14|21 cm. 52 pĝ. Prezo: 3 fr. fr. plus sendkosto: 0.50 fr. (0.30 por landoj aliĝantaj al la konvencio pri favora tarifo por libroj). Eldonejo: **Esperanto**, 14 av. de Corbera, **Paris** (XII). Poŝta ĉekkonto: E. Adam; Paris 1350-62. Respondkuponoj akceptataj.

Tiu verko estas unika en sia speco: ĝi konsistas el dialogo inter tri personoj: Futer; la herezulo, Ruper, la ortodoksulo k. Iver, la objektiva atestanto; kiu vivis dum pluraj jaroj en Sovetio; tie laboris; restante ĉiam en intima kontakto kun la simpla popolo, k. forlasis la landon antaŭ ne longe. Tiu dialoga formo donas vivon k. intereson al temo, kiu estus sen tio alirebla nur de fakuloj.

La preso, aranĝo k. papero bonaj; se ni aldonas, ke la broŝuro estas ilustrita, konsidere la malaltan prezon, ĉiu kiu ial interesiĝas pri Sovetio k. sociialismo, tiu nepre devas posedi tiun vere valoran verkon; plenan je informoj k. kongruaj argumentoj.

◆ Esperantista Akademio. JARLIBRO de la LINGVA KOMITATO KAJ DE ĜIA AKADEMIO. 1935. Paris. Esperantista Centra Librejo; 11 Rue de Sevres (6o.) Prezo 2 fr. fr. — Jen broŝuro kiun ĉiu grupo devas posedi.

◆ GRAMATICA ELEMENTAR DE ESPERANTO. A. Couto Fernandes e H. Motta Mendes. 2a. Edicao. E.ldonis Irmaos Pongetti. Rio de Janeiro. Prezo 4.000 rejsoj. La verketo certe ne taŭgas por memlernado, sed ĝi povas esti taŭga helpilo por kursoj, cetere ĝia dua eldono tion bone elmontras. Kaj tio, kio restos preskaŭ nerimarkite en Eŭropo estas vera evento en la esperantista mondo de Sudameriko: Apero de pli ol unu libreto en unu jaro! Ĉu ni troviĝas ĉe la sojlo de pli brila estonto?...

◆ AUSTRIO invitas la tutmondon al XXVIII Kongreso de Esperanto. — Broŝuro pri la aŭstria Federaciaj Landoj kaj iliaj ĉefaj vidindaĵoj. Fotoj kaj landkarto. Laŭ doj pri la famkonata bonega prezento de la aŭstriaj gvidilojn estas superflue. De la jaro 1928 ili ĉiu jare nur pliboniĝas. Ricevebla de la eldonisto: "werbedienst des Bundesministeriums fur Handel und Verkehr" wien, I. Nibelungengasse 4.

◆ ESPERANTO, LINGUA AUXILIAR INTERNACIONAL. Eldonis "Brazila Ligo Esperantista". Rio de Janeiro. Poŝtkarto kies dorsa flanko kunportas resumon de esperanta gramatiko.

◆ TRA MISTERA ORIENTO AŬ MIAJ MEMORAROJ. Stjepan Miŝah. 1a. k. 2a. volumetoj. Adana, Turkujo. Prezo 2 resp. kup. ĉiu. Travivaĵoj de la aŭtoro en Oriento, tro najve rakontitaj. Lingvaĵo ne bona.

◆ LA PACO — Broŝureto de pacisma propagando laŭ religia vidpunkto. Senpage havebla ĉe la eldonisto: Bosham House, Chichester. Anglujo.

◆ ADRESLIBRO DE KOMERCAJ REprezentantoj en Bukareŝto (Rumanujo) 1935 Eldonis Komerca kaj Industriaj Ĉambro en Bukareŝto. Libro 150 paĝa kun antaŭparolo kaj klarigoj en la lingvoj: rumana, franca, germana; angla kaj esperanta. Jen ankoraŭ pruvo ke nia afero marŝas.

◆ ELDONA SOCIETO ESPERANTO; Stockholm; Svedujo; eldonis novan tre enhavoriĉan katalogon pri lernolibroj, vortaroj; literaturo diversspeca. propagandiloj ktp. La plej multaj libroj estas koncize priskribitaj kun indiko pri la jaro de la apero. nombro de paĝoj kaj la speco de la enhavo. La katalogo; kiu, estas dissendita en 10.000 ekzempleroj; estas en sveda lingvo.

◆KOLIN. Ĉekoslovaka Respubliko. 1935. Eldonis Esperantista Klubo. Kolin. Prezo 1 k. ĉ. aŭ int. res. kup. — Gvidlibro pri la urbo Kolin. Historio kaj priskribo. kelkaj fotoj kaj desegnaĵoj. Plaĉa aspekto.

◆ LA LANDO DE REMBRANDT — Bela faldfolio pri nederlando. Fotoj, karto. Ricevebla de Federacio de Nederlandaj socpor interrilatoj kun frenduloj. Lange Voorhout 102. Den Haag.

VIENA FOIRO. 1935 — Ilustrita faldfolio.

WIEN — Turisma faldfolio. Fotoj, konsiloj, indikoj por turistoj..

WIEN KAJ NIEDEROSTERREICH. 1935.

Kiel la antaŭa; sed pri alia regiono. Havebla ĉe Oficejo por fremdultrafiko Messepalast; Wien VII.

J. HESS

Somera Rondo

Quedan invitados los amigos del Esperanto a concurrir todos los domingos al Recreo "El Pescador", en Anchorena, F. C. C. A., lugar donde habitualmente se realizan nuestros pic-nics, y en el cual Argentina Esperanto Asocio ha instalado una carpa.

No dudamos que éste ha de ser un aliciente para reunir a todos los esperantistas y simpatizantes "ĉirkaŭ nia tendo".


Balance y lista de donaciones Pro-Carpa de A.E.A.

A. Barrot $ 5.; A. Corral $ 5.—; A. B. Solé $ 5.—; M. Durán $ 5.—; E. Bravo $ 1.—; J. Sabaté $1.—; Libertad Sabaté $ 1.—; J. Martínez $ 5.—; I. Berman $ 1.—; H. Bobbiesi $ 2.—; A. Villafranca pesos 3.—; G. García $ 2.—; Fermín Varela $ 2.—; Luis Vila $ 1.—; B. Berger $ 2.—; J. Hess $ 1.—; Dionisio Ruiz $ 1.—; J. Chiapini $ 1.—; I. Frenández $ 1.—; E. Rzodkiewiez $ 3.—; F. Clevillé, pesos 1.—; A. Vila $ 1.—; B. Gaggianesi $ 1.—; Svedeto $ 1.—.

Total, recibido por donaciones .. .. $ 52.—

SALIDAS

Al Sr. J. Chiappini, por una carpa,	$ 40.—
Por pago del alquiler al Recreo "El Pescador", mes de diciembre	" " 10.—
Gastos varios	" 2.—
Total: Entradas	$ 52.—
Total: Salidas	" 52.—



La Juĝisto — La eksedziĝa demando de via edzino estas akceptata, tial vi lernos konduki vin kiel bona edzo.



FALO

La apotekisto, sentis sin feliĉa pro la morto de sia edzino. Virino tre kolera kaj malĝentila.

Oni metis ŝian korpon en la ĉerkon, kaj kelkaj homoj kondukis ĝin al enterigejo. Sed okazis ke unu el la homoj falis, kaj la ĉerko rulis sur la tero. Neatendite, la virino kiu vere ne estis morta, leviĝis kaj piede reiris hejmen, antaŭ la terurigitaj akompanantoj.

Post du jaroj denove ŝi mortis. Tiu foje estis vera morto, tamen la edzo, kiam la homoj kondukis la ĉerkon insiste rekomendis. Bonvolu atenti ke neniu falu!!

MALFELIĈO

La Edzo — Laŭ la kuracisto, se mi daŭras fumante, mi krevos antaŭ unu monato.

La Edzino — Kia bedaŭro karulo! Nur mankas al mi kelkaj kuponoj por partopreni la loterion, organizita de cigaredfabriko.

LERTECO

Profesoro — Ĉu iu el vi povas ion diri pri Salomono?

Lernanto — Jes S-ro. profesoro, li estas amiko de mia patro.

ĈE LA JUĜEJO

Juĝisto — Kial vi frapis per via tranĉilo, en la ventron de la viktimo?

Kulpigito — Ĉar en tiu momento alproksimiĝis policanoj, kaj mi devis malaperigi ian ajn objekton kiu povus kulpigi min.

KORESPONDADO

Trilinia anonco en Koresp Fako 0.30 arg. mono

S-ro Valentin Percik, 23 jara. Muzikisto, Dez kor. kĉl. pri artoj, respondas almenaŭ unu foje. Adreso: Gobernador Candioti F.C.S. Fe. Argentino.

S-ro Tomas del Valle, pri kinematografaj temoj. Adreso. Str. Blandengues 539. Bahia Blanca, Argentino.

S-no. P. J. Campos,— Sendu 100 PM. el via lando, reciproke mi sendos PM. el Ameriko. Mi interŝanĝas P.M. per libroj. — Villa Angela, Chaco, Argentino.